
# Jen nia mondo, Leciono 2




Jen novaj demandoj por vi:

1. Kio estas en la granda sako? Kiaj estas la libroj?
2. Kio estas en la alia sako?
3. Kiaj estas la pomoj? Kaj la bananoj?
4. Ĉu vi ofte ŝercas? ('sxerco' = germane 'Scherz')
5. Ĉu februaro* estas varma aŭ malvarma?
6. Ĉu decembra (c = ts) tago estas longa aŭ mallonga?
7. Ĉu teo sen sukero estas dolĉa?
8. Kia estas citrono*? Ĉu dolĉa?
9. Ĉu vi estas riĉa aŭ malriĉa?
10. Ĉu brunaj bananoj estas bon-gustaj? Ĉu ili estas malbongustaj?
11. Ĉu malnovaj aŭtoj ofte estas difektaj?
12. Kia estas via (malnova) biciklo? Ĉu ĝi estas difekta? Ruĝa? Bona?
13. Ĉu via malmola disko estas difekta?
14. Kie estas via hejmo*? Ĉu en la nordo aŭ en la sudo de la lando**?
15. Ĉu la ekonomio de Norvegujo estas solida?
16. Ĉu albanoj kaj serboj estas bonaj amikoj?
17. Ĉu la araboj estas malamikoj de Israelo?
18. Ĉu Usono estas malamiko de Irako?

## Kompletigu! Uzu vortaron por fari frazojn.

La ___________OJ estas ____________AJ.

Kie estas la _____OJ? Ili estas en/sur la ____O.

La ___________OJ en/sur la _____O estas (mal)_____AJ.

Por viaj notoj: ______________________________________________

**Klarigo por la instruantoj**

* Mi uzis kelkajn vortojn kiuj ne aperas en la leciono, sed kiuj estas tuj kompreneblaj por skandinavoj (kaj parte ankaux por germanoj kaj angloj). Por lernantoj alilingvaj konvenus modifi la demandojn, uzante aliajn vortojn tuj kompreneblajn por _ili_